

V-22476/A

Nal. poczt. opt. rycz.

JUNA ESPERANTISTO

INTERNACIA MONATA — JUNULARA REVUO.

OFICIALA ORGANO DE TUTMONDA ESPERANTO-JUNULARA ASOCIO.

Jaro I.

Aprilo 1933.


Nr. 3.

REDAKCIO-ADMINISTRACIO: KRAKÓW, LELEWELA 9 m. 2 (POLLANDO).

Jarabonprezo en Pollando 4 zł.
» eksterlande 2,50 sv. fr

ĈEFREDAKTORO
EMIL MAYER.

Poŝtĉekkonto:
Kraków P. K. O. Nr. 413-944.



Vizitu Budapeŝton
Kunveno de Skolta Esperantista Ligo 1-16 aŭgusto 1933 jamboreo.

UNUECO FORTIGAS.

Estas malnova, sed tre vera proverbo, ke al la junularo apartenas la estonteco. Tiu validas precipe por ni, la esperantista junularo. Sed se ni volas posedi la estontecon, ni nepre devas unuiĝi. TEJA estu la idealo-akceloto. Post longa krizo ĝi komencas refortiĝi sub la celkonscia gvidado de la prezidanto kaj de la nova Centra Oficejo. Ĝi atendas nun la anonciĝon de landaj reprezentantoj kaj kunlaborantoj, sed ankaŭ aliĝojn multnombrajn de Esperanto-gejunularo kaj grupoj.

Kiel taŭgna kaj belaspektan ligogazeton ni nun havas »Junan Esperantiston«, la altkvalitan oficialan organon de TEJA.

La fundamento nun staras kaj dependas de la rada fervoro de la junaj geesperantistoj ĉu la kon-

struado progresas rapide aŭ malrapide.

Jen bona korsilo por la Esperantogrupoj diverslandaj: Donu al la junuloj de via lando propran konstitucion en formo de subgrupo, por ke ili laboru memstare sur la verda kampo de la juna mondo, kaj ili ĝoje kaj fervore laboros, varbos, konstuos propran dometon. Donu al ili ĉian eblan liberecon kaj post nelonge la maljunaj verduloj lernos de la junuloj koncerne fervoron kaj amon al la sankta afero.

Igu la novajn grupetojn aliĝi al TEJA, al la centro de la junulara movado kaj vi helpos per tio plugi la novan kampon, semu la verdan semon. La junuloj observas la kreskadon de la verdaj arboj kaj grave helpos al la fina venko de nia kara Esperanto.

Theo Kutzli, Direktoro, de TEJA.

Karaj ne-junaj Samideanoj!

En la gejunularo kuŝas la nuna vigleco, estonta ferto kaj definitiva triumfo de l'Esperanto-Movado. Kiu plej arde entuziasmiĝas pri nia afero? La gejunularo! Kiu plej obstineme esperas por plena sukceso? La gejunularo! Kiu neniam senkuraĝiĝas malgraŭ la plej severaj batoj? La gejunularo! Do kian movadon la esperantistaro devas antaŭ ĉio helpi kaj progresigi? La gejunularon!

Bedaŭrinda fakto estas, ke la gejunularo estas malriĉa kaj sekve malfacile povas mem subteni propran fortan asocion kaj ĝian organon.

Tutmonda Esperanto Junulara Asocio komencas sian dekkvaran vivjaron. Dank al nelacigebla klopodado ĝi sukcesis per novorganizo refortigi la asocion kaj akceli kiel oficialan nian organon. Sed la sukcesojn ni ĉefe nur atingis dank'al nejunula helpo.

Do ni alvokas la tutmondan esperantistaron kaj finfine diras: Ni bezonas nek vortajn aŭ skribajn kuraĝigojn, nek aprobojn, nek aplaŭdojn; ni bezonas iom da mono. Kiu deziras partopreni en la estonta triumfo de Esperanto, tiu subtenu la gejunularon, tiu monhelpu!

Esperanto dum la klubkunvenoj.

Post finita kurso ordinare sekvas la malfacila sed grava laboro perfektigi la novakiritajn anojn, teni ilian intereson varma por konservi ilin por estonta daŭra kunlaboro. Tion ni povas fari se ni klopodos fari niajn kunvenojn kiel eble plej allogaj kaj samtempe instruaj. Tiucele ni devas tion prizorgi, ke la novaj havu scion pri la ekzisto de la asocio. Tial ni ne lasu la okazon agiti por T.E.J.A. - S.E.L. La aliĝo estos ja tre malalta. Sufiĉe klare devas esti al ĉiu esperantisto, ke oni nur per organizo povas atingi rezulton. Ankaŭ tre grava estas, ke ĉiu el ili abonigu esp. gazeton, ĉar pere de ĝi ili havas ligilon kun

tutmonda samideanaro kaj ĝi informados ilin pri ĉiuj okazintaĵoj en la Esperantujo.

Bedaŭrinde ni devas konstati, ke multaj esp. kluboj ne uzas dum la kunvenoj nian lingvon. Kial? La »novbakitaj« esperantistoj devas ĉiam aŭdi la lingvon, kaj speciale en la klubo, tial ke ĝi devas esti la ekzercejo.

Post kelkaj semajnoj la novaj estas invitataj al la klubo, kaj kion aŭdas, nacian lingvon anstataŭ Esperantistan!

Esperanta klubo devas labori tiel, ke la nacia lingvo estu konsiderata kiel fremda lingvo. Nur en tiuj kluboj, kie oni parolas esperante oni povas sperti viglecon.

Se vi sincere deziras la prosperon de junulara esperantista movado ekabonu tuj nian revuon.

LA PLUVERO.

Michael Berkeley.

Iam, sur la rando de nubo, sidis multaj pluveroj, atendante laŭvice malsuprenfali.

Kelkaj, same kiel iuj etaj infanoj, estis feliĉaj; kaj kelkaj, same kiel aliaj infanoj, aspektis malfeliĉaj.

»«or kio mi utilas?» grumblis maldika pluvero. »Mi estas tro malgranda por eĉ iomete malsekigi peceton da tero«, kaj ruliĝante tro proksimume al la rando, ĝi falis teren.

»Bonan tagon!« diris ranunkoleto, tre ĝentile. »Mi estas tre feliĉa vin vidi. La tutan tagon mi trege soifis, kaj mi estis tre varma. Nun, post via alveno, denove mi malvarmetiĝas, kaj la soifo jam malaperis.«

»Se ĉi mi estas tiel malgranda« plendis la pluvero.

»Se vi estus granda kaj dika, vi klinus mian kapon, kaj eble ĝi rompiĝus.« La ranunkoleto delikate balanciĝis pro la venteto, tiel ke la pluvero defalis al la pluvengardanta vizaĝo de lekanteto.

»Ho, tre kara pluvereto!« Kiel ĝoja mi estas, ke vi alvenis, ĉi mi estis la lekanteto. »Mi forte soifas.«

»Mi baldaŭ malaperos« grumblis la pluvero, kiu plimalgrandiĝis.

La lekanteto ne respondis, sed nur suprenturnis la beletan vizaĝon al la suno, kiu vaporigis la pluveron, kaj denove metis ĝin sur la nubon.

Tiufoje, ĝi restis meze de la nubo, ne tro proksime de la rando, kaj tial ĝi falis ĝustatempe, kune kun la aliaj.

Malsupren kaj pli malsupren ĝi iris, ĝis ĝi falis en rivereton, kiu plaŭdetis tra la arbaro, kaj ĉiam lulkantetis.

lajoje, la rivereto fluis trans ŝtonegojn; iajoje ĝi flankeniris ilin, sed ĉiam ĝi kantis, kaj fine la pluvero, kiu antaŭe estis parto de la rivereto, ankaŭ kantis.

Nur simpla kanto. Sed kiam la gutoj venis al la ŝtonoj, ili feliĉe ridis. Kelkfoje, ili renkontis etajn ŝtonojn, kiujn ili portis laŭ la vojo. La ŝtonetoj grumblis kaj protestis, sed la rivereto nur ridis.

Survoje troviĝis folioj, kiuj floris malrapide aŭ rapide, ĝis iu arbo, kliniĝis malalte por sin rigardi en la spegulo de la akvoj, fikse ilin kaptis.

»Kien ni iras?« la pluvero demandis al la rivereto. »Al la maro, por pligrandiĝi ĝin, por ke la grandaj ŝipoj povu veturi sur ĝi.«

»Sed ni perdiĝos en la maro«, timeme diris la pluvero.

»Ĉu gravas? Ni estos farintaj nian devon. Se ni sencele malrapide, sentante nin tro malgrandaj kaj senutilaj en la mondo, nenio ajn fariĝos. Min formas vi, pluvgutoj, kaj se vi restus tro longe en la nubo, mi estus mizera kaj malgranda, povante nur malrapide kiam vi falas. mi larĝiĝas kaj plilarĝiĝas, kaj antaŭ ol mi atingos la maron, mi estos grandega kaj fortega. Estu feliĉa, eta pluvero! Nenio en ĉi-tiu mondo estas tute senvalora. Utilas ĉiu devo plenumita kaj ĉiu bonfaro. Ni devas neniam retiriĝi sentante nin tro malgrandaj, sed kontraŭe, ni devas ĉiam antaŭeniri, kaj diri.« »Mi faros mian eblon.«

La rivereto ĉesis paroli, kaj ekkantis korfeliĉe. La eta pluvero denove partoprenis la kanton, kaj kurrante ĉirkaŭ kurbiĝon, la gutoj ridis ĝoje.

»Maren, maren!« Tio estis ilia kanto, kaj ili neniam laciĝis, ĝis ili atingis la grandegan maron, kaj pace sin verŝis en ĝin.

Tutmonda Esperanto-Junulara Asocio

Prezidanto: D-ro William Perrenoud.

Centra oficejo: Rudolf Kutzli, Scheibenackerstr. 6, St. Gallen
SVISLANDO.

TEJA SERVAS!

Mi jam ofte audis la demandon: »Kian profiton mi havas, estante ano de TEJA? Ĉu TEJA vere servas kaj kunportas ion al la Esperanto-movado?» Estas vere granda kaj grava demando, ĉu internacia junulorganizaĵo esperantista havas ekzistrajton ĉu ne estus pli bona, kolektigi la tutan Esperantistaron en unu granda, forta asocio?

Sed tuj alvenas grava, pripensenda fakto. Ni ĉiuj tre bone scias, ke la propagando de Esperanto inter la junularo estas unu el la plej gravaj taskoj de la Esperantistoj. La junuloj de hodiaŭ estas la plenkreskuloj de morgaŭ. Ili estas la venonta generacio kiu vidos la finan venkon de nia ideo. Ni nur preparas, la venonta generacio finigos.

Sed por efike kaj kun sukceso propagandi nian lingvon inter la junularo, estas nepre necesa, kolektigi la junulojn kaj junulamikojn en asocio, kiu havas speciale tiun celon. Estas ankaŭ certa sperto, ke junuloj, lerninte Esperanton, grandparte forgesas la konon de la mondlingvo kaj la intereson por ĝi. Do estas tasko de tutmonda junulorganizaĵo, zorgi, ke tio ne povas okazi. Tutmonda Esperanto Junulara Asocio (TEJA) havas tujn celojn kaj estas la sola internacia, neŭtrala junulorganizaĵo. Mi citas la unuan paragrafon de ĝia regularo:

§ 1. CELO: Koncentrigo de ĉiuj fortoj por

1. servi al la Esperanto-junularo, ne diferencante pro raso, religio aŭ lingvo;

2. antaŭenigi la Esperanto-movadon inter la tutmonda junularo;

3. kreskigi inter ĝiaj membroj fortikan senton de solidareco kaj disvolviĝi ĉe ili la komprenon kaj estimon de ĉiuj popoloj.

Vi nun certe konvinkiĝis, ke TEJA havas ekzistrajton kaj eĉ estas nepre necesa parto de la Esperantista organizaĵo.

Sed por kontentige atingi nian altan celon, estas necesa, ke ĉiu membro, ne nur la sinjoroj delegitoj, ĉiam kaj lerte kunlaboru; Ankaŭ vi senĉese laboru kaj varbu! La certege venonta sukceso kronos niajn klopodojn.

Do tuj aliĝu al TEJA! Ankaŭ vin ni bezonas! La jarkotizo estas minimume unu kaj duono svisa franko. Se vi volas doni iom pli, vi bone servas al ni.

Se en iu loko

troviĝas kelkaj junuloj Esperantistaj, ili tuj formigu junularan grupon. En unuiĝo estas forto. Nur tiel oni povas efike labori. La tasko de loka grupo estas, pliperfektigi ĝiajn anojn kaj propagandi Esperanton en la loka junularo. Per aliĝo al TEJA vi havas kontakton kun la junuloj en la tuta mondo. Sendu la adreson de via plej kapabla membro al la Centra Oficejo aŭ al via ĉefdelegito, por ke li estu elektata kiel loka delegito de TEJA. Interŝanĝu viajn spertojn kun alilokaj junularaj grupoj, ekzemple kun la tre vigla Esperanto Junulara Grupo Verda Stelo en St. Gallen. Aliĝante al TEJA vi plivigliĝas vian kluban vivon kaj plejbone servas al Esperanto.

K-i.

ALVOKO AL IAMAJ TEJANOJ.

Teja revekiĝis kaj organiziĝis denove. El kelkaj landoj jam anonciĝis novaj freŝaj batalantoj por nia Teja. Sed tio signifas nur la komencon. Kun multaj landoj ni ne ankoraŭ povas interrilati.

Do, vi iamaj fervoraj anoj de nia junulara asocio skribu amase al la Centra Oficejo, deklaru vian pretecon, kunhelpi je la novkonstruado de nia domo, kolektu gejunulojn, kotizojn, abonojn por nia revuo. Helpu malgraŭ la malfavora tempo unuigi la junajn esperantistojn. Pripensu ke unuopaj samideanoj ne povas efike labori, sed per kunlaboro en junularaj grupoj ili kapablas puŝi antaŭen nian ideon.

Ĉar la Centra-Oficejo ne povas efektiviĝi ĉion, ĝi bezonas helpantojn el la tuta mondo: ĉefdelegitojn, regionajn kaj lokajn delegitojn.

Petu de ni la regularon pri la deĵoj de la delegito Cetere ĝi aperis en la dua numero de J. E. Akceptu ĝoje ian oficon, nenies laboro estas malgrava.

Abonu nian revuon, en kiu aperadas regule la sciigoj kaj raportoj de la Centra-Oficejo.

Faru proponojn libere al ni pri novaj ideoj, pri praktika eluzo de nia revuo.

Ni kolektu la adresojn de Tejanoj, kiuj intencas viziti la Kongreson en Köln. Se iel eble estas aranĝota fakkunsido de T.E.J.A.

Kuraĝe antaŭen al la celo

Kun samideanaj salutoj

la Centra-Oficejo

de Tutmonda Esperanto-Junulara Asocio

SCIIGOJ DE LA CENTRA OFICEJO

Novaj delegitoj.

Loka del. Germanujo: Merseburg: S-ro

Hans Boos, Stufenstrasse 3.

" " " Elbing: S-ro Otto Dreyer,

Gr. Lastadienstr. 7.

" " Japanujo: Kisiwada S-ro Ka-

wasaki-Haruo, Kitanmati 44.

Ĉefdel. Jugoslavujo: Zagreb, S-ro Lapenna

Ivo, Primorska ul. 11.

Loka del. Nederlando: Bussum: S-ro P.

Bosman, Oosteinde 13.

" " Polujo: Bydgoszcz: S-ro Patalong

Janusz, Kościuszki 38

" " " Varsovio: S-ro Rubinstein

Assir, Nowowiejska 25/11.

Ĉefdel. Portugal: Setubal: S-ro Alberto

Henrique de Sousa, hargo

Dr. Francisco Soveral 43 a.

Loka del. Svedujo: Hällekis: S-ro Helge

Frisk.

" " Svisujo: Montreux: S-ro Bellion,

postes.

Varbu abonantojn por

„Juna Esperantisto“

TRA ESPERANTUJO.

Fervojo, radio, poŝto, polico jen la ĉefaj kampoj, kie la helplingvo trovas uzadon plej vastan. Subskriboj en vagonoj, rapida disvastigado de novaĵoj pri nia lingvo, tekstoj de regularoj, oficantaj funkciuloj parolantaj la lingvon, estas la unuaj pruvoj de la uzado.

RADIO.

Laŭ statistiko prilaborita de la Internacia Radio-Komisiono pasintjare 94 sendstacioj en 17 landoj de Eŭropo dissendis 2090 Esperanto-disaŭdigoj. Kiel ni povas el ĉi-tio konstati esp-lingvo estas pli kaj pli enkondukata en radiodissendoj de ĉiuj landoj. Bonvolu ekatenti, ke statistiko montras nur pri disaŭdigoj de la Eŭropo, restintaj 4 partoj de la mondo ŝajne ankaŭ ĉi-tiun prikalkulon pligrandigos.

Helpu do laŭpove al efektivigo, ke en ĉiu radiostacio de la mondo Esperanto estu enkondukota. Sendu do al radiostacioj de via-lando, postulon pri konstanta disaŭdigo de la esp.-programo. Skribu ĉiam en nacia lingvo por landa radiostacio se vi deziras enkondukon la esp.-kurson en radioprogramo. Indiku nomon kaj adreson. De vi mem dependas ĉefe, ĉu ni havos la esp. prelegojn en la radio aŭ ne.

Aŭskultu polajn disaŭdigojn! la prelegojn komencaĵados je la 22 h. 35 m ĝis 22 h. 55 m. Ĉiun duan merkredon.

5 IV. S-ro I. Hodakowski: »400 jara datreveno de genia skulptisto Wit Stwoszc«

19. IV. S-ro dro Chwistek: »Spirita kulturo de Polujo«.

3 IV. S-ro dro Zborucki: »Poloj kaj Pollando iam hodiaŭ«.

17. IV. S-ro prof. Bujwid: »Kuraĵaj banlokoj en Pollando«.

31. V. S-ro prof R. Wacek: »Somero en Pollando«

14. VI. Koncerto kaj prelego s. t. »Beleco de la pola muziko«.

28. VI. S-ro prof. Mempicki: Scienco kaj klereco en Polujo«.

12. VII. S-ro Z. Sobota (blindulo): »Protekto al blinduloj en Polujo«.

26. VII. S-ro T. Hodakowski: »Esperanto kaj rolo de poloj en ĝia disvolviĝo.

(Daŭrigota)

Ĉi supraj prelegoj estos disaŭdigitaj de stacioj Kraków kaj Warszawa.

FERVOJO.

La propagando de Esperanto inter la fervojistoj vige estas disvastigata. Tiun ĉi gravan laboron transprenis la Internacia Asocio de l'Esperantistoj-fervojistoj. Vere ĉu ni povas imagi al ni pli utilan aplikon de esp. ol en tiel disvastigita fervojistaro-tutmonda.

En Jugoslavujo oni aprobis, ke en ĉiuj vagonoj de l' sudslava fervojaro, destinitaj por internacia trafiko oni uzu Esperanton, sur afiŝoj kaj avizoj. Ankaŭ surskriboj en vagonoj kiel »Ne kraĉu«, »Ne klinu vin el la fenestro«, »Alarmbremsu« k. t. p. Lasttempe al la prezidanto de la Internacia Esperanto Muzeo en Wien S-ro registara konsilanto Hugo Steiner, estis donata permeso gvidi E-kursojn por fervojistaro en Wien. Multaj esp.-kursoj estas gvidataj inter fervojistaro en Francujo, Ĉeĥoslovakujo, Svisujo, Polujo, Italujo. Ne-

derlando k.t.p. La propagando en fakorganoj de fervojistoj trovas ĉie subtenon. En sveda organo »Signalen«, en svislanda sindikatorganaj »Der Eisenbahner kaj »Le Chemiten« oni regule publikigas Esp.-angulon. Tute en esp. aperadas »Komunikoj por la gazetaro« eldonataj de la erracia Transportlaborista Federacio en Ollando, Amsterdam, Vondelstraat 61.

POŬTO KAJ TELEGRAFO.

Propagandon de Esperanto inter samprofesiaj gvidas Internacia Ligo de Esperantistaj Poŝt kaj Telegraf-Oficistaro. La bezono de unu internacia lingvo por tiu ĉi fako estas nepre necesa. Komprenante ĝin la diversaj landoj akceptis Esperanton kiel oficialan help-lingvon kaj permesas skribi adresojn sur sendaĵoj en ĉi tiu internacia lingvo. kelkaj landoj eĉ eldonis oficialajn poŝtkartojn kun esp. klarigoj. (Lichtenstejno, Sovieto) kaj lasta eĉ ankaŭ poŝtmarkojn kun esp. teksto. Efektive tiaj aranĝoj faris grandegajn impresojn ana registaro kaj interesitaj rondoj. Jen ni konstatas. kemaĝraŭ la kriza tempo kiu multon malhelpas al plena disvastigo de internacia lingvo, ni tamen iras antaŭen.

POLICO.

La internacia Polica Ligo prezentas politike kaj religie neŭtralan unuiĝon de policistoj el ĉiuj landoj, lernintaj la helplingvon Esperanto. Ĝi celas, propagandi la lingvon Esperanto inter la policanaro tutmonda, kunlingi esperantistajn policistojn por progresigi inter ili la fakscion kaj la senton de la profesia solidareco internacie. Plue komprenigi al la publiko la sencan de la polica laboro por solvi ĝin en harmonia interkonsento kaj fine akceli la enkondukon de la helplingvo Esperanto en la internacia polica servado per helpo de la kompetentaj estraroj.

Liga Direktoro

Paŭl Teuchner, Leipzig o.28, Eisenbahnstr. 111. b.

STENOGRAFIJO.

Ni devas gratuli la fondon de (S. I T. Stenograf Instituto Tutmonda, kies celoj estas la divastigado de Esperanto-stenografio en tutmondo. Dank'al nelacigebla fervora laboro de s-ro P. Flageul en B. Voltaire, Issy Les Moul, Seme, Francujo, aperas monata gazeto-stenografia »Fluganta Skribilo«.

Esperanto kiel helplingvo por kolektantoj de poŝtmarkoj. Ni ne devas konvinkigi la filatelistan mondon, k3 ĝi nepre bezonas lingvon internacian. Certe ĉiu el ni jesos, ke espranto estas taŭga lingvo por la kolektantojn de poŝtmarkoj. Fondiĝinta antaŭ kelkaj jaroj Tutmonda Asocio Kolektanta akceptis Esperanton kaj eldonas sian organon »Tutmonda Kolektanto« en esp. redakti'an de D-ro Josefo Takacs Nagymaros, Magyar u 26 Hungarujo. Ĉiuj do intereso- toj bonvolu turni sin al ĉi supra adreso.

John Mabon Warden †

Frezidanto de la esperantista Akademio mortis 7-an de marto 1933. Granda perdo por la tuta esperantistaro trapis nin subite. Unu el plej eminentaj, el plej meritplenaj personoj rilate al disvastiĝo de Esperanto forlasis nin.

El la junulara vivo.

Esperanto en la Oficialaj lernejoj.

Laŭ statistiko de I.A.L.A. (Intern. Auxil Language A.) oni konstatis, ke ekzistas en 62 landoj 7.021 Esperanto-instruistoj. En 37 landoj ekzistas 1,053 lernejoj kun Esperanto-instruado.

DU GRAVAJ SUKCESOJ EN LERNEJOJ DE AŬSTRO
Kleriga Lernejkonsilantaro por supra-Aŭstro en Linz, N-ro Allg. 82/2
Esperanto-kurso 1933.

Linz, la 4. okt. 1932.

Al Lernejkomitato de Metiaj Klerigaj Lernejoj en Linz.

Rilato al la sukcesa finigo de la Esperanto-kurso, gvidita de s-ro Jozef Mraz, dum la pasinta lernejarlo, estas dekretata per ĉi tio restarigo de ĉi tiu kurso dum la lernejarlo 1932-33, sub la kondiĉoj de l' dekreto de la 28-a de aŭgusto 1931, N-ro 3/3.

Pro la jam dujara kontentiga instruado la salairigo de la instruado okazos sub kondiĉoj de la honoraria grupo I.

La Lerneja Komitato estas invitata komisii la administran gvidantaron atentigi dum oktobro pri la okazigo de la kurso la gelnantojn de la metiaj klerigaj lernejoj kaj anonci la nombron de la sin anocitoj ĝis plej malfrue la 27-a de oktobro 1932.

La prezidanto: Franz Poel p. m.

Landa Lerneja Konsilantaro de Strio

V. 12, 9/7 1932 Graz, la 8. okt. 1932.

Koncernas: Lernejdistrakton Voitsberg.

Esperanto instruado.

La federacia Ministerio per reskripto de 3. 10. 1932 n-ro 26068/11/9 sciigis kaj ordonis jenon:

La enkonduko de la Esp.-instruado en la ĉeflernejoj de la lernejdistrakto Voitsberg laŭ § 17, alineo 6 de la ĉeflernej-leĝo escepte estos permesata por la kuranta jaro.

La klasigo de la lernejrezultoj estas permesata, sed ĉi tiu fakto devas esti submetata al la nedevigaj fakoj en la lernejatestoj.

Je na fino de la lernejjaro raporto pri la koncerna instruado estas atendata.

Lauppert.

EN ITALUJO: ANKAŬ NUNJARE EN LA LICEOJ DE VENEZIA ESTOS LERNIGATA ESP-O

Reĝa zorgantejo de la studoj en la Venezia-Provinco.

Venezia, 23 novembro 1932 (XI)

Al la S-roj Direktoroj de la Liceoj de Venezia: Objekto: Pri Esperanto-kursoj.

La Prezidanto de la Venezia Esperantista Grupo esprimis la deziron ha vi en la Reĝaj Liceon de la urbo ankaŭ dum la jaro 1932-33, komencante la unuan de januaro 1933. Esperanto-kurson.

Memorigante mian antaŭan 7-3 1932, n. 1415; konsiderante ke tia helpa lingvo estas lernigata ankaŭ en aliaj multaj Nacioj eĉ kiel deviga fakto; uzata ĉiam pli en la Radio, en Komercaj Foiroj kaj en la Turismo; kaj vidinte la bonajn sukcesojn atingitajn pasintjare, mi permesas al Viaj Moŝtoj intertrakti kun la Prof. F-ino Minio-Paluella Carolina, por ke tiaj kursoj povu esti klarigitaj ekster la lerneja horaro en la urboj Liceoj.

La Reĝa Zorganto de la Studoj
p. m.: Umberto Renda

Ĉeĥoslovakujo (Olomouc). S-ro lernejestro A. Neuzil, gvidas konstante esp. kursojn por gelnantoj en la popolernejo. Imitu aliaj lokoj.

Estonio (Nova). En la gimnazio komenciĝis esp. kurso por gelnantoj de la estona gimnazio. Partoprenas 50 p.

(Paide). En la loka gimnazio 75 gelnantoj esprimis la deziron lerni Esperanton.

(Tartu). Okazas esp. kurso kun 46 p. por lernantoj de Industria Lernejo.

Francujo (Bordeaux). La Kongreso de la Snidikata Federacio pri laika instruado en Bordeaux, fine de pasinta jaro unuanime voĉdonis rekomendojn, ke ĉiuj geinstruistoj en la Federacio lernu Esperanton, kaj de Esperanto estu instruata en ĉiuj lernejoj. Similan rezolucion unuanime voĉdonis la Nacia Sindikato de Francaj Geinstruistoj en Clermond-Ferrand.

Germanujo (Hildesheim). La loka junulara grupo aranĝis ekspozicion de esperantaj. Oni montris korespondajn kaj gazetojn el diversaj landoj.

Italujo. La Itala Ministrejo de Publika Instruado skribis, ke libervolaj kursoj de Esperanto estas ĉiam permesataj en italaj lernejoj.

ŝvedujo. En Skara faris prelegon kaj provlecionon antaŭ 60 geinfanoj en ĉi-tiea lernejo pola s-ano Schuldenfrei. La instruistaro estas tre favora al esp.

(Axevala). Nuntempe proksimume 30 p. partoprenas la studadon de Esp. en la popolalternejo. La rektoro de la lernejo s-ro G. Arninge en sia antaŭparolo esprimis sian kontencon pri Esperanto kiel libervola studtemo en la lernejo.

Jugoslavujo (Zagreb). Studenta Esperantista klubo festis solene la 5-an de marto sian 5-jaron jubileon en la ĉembrego »Kolo«.

AL ĈIuj ESPEANTISTAJ AKTIVULOJ de POLLANDO!

Estimataj Gesamideanoj! La de Ĉiuj Esperantistoj de Pollando delonge revata kaj atendata »Pola Esperanta Presservo«, pri kies fondiĝo vi legis en la marta Nr. de »Juna Esperantisto« fariĝis fakto: La »Pola Esperanto-Asocio« — Centrejo en Warszawa, dank'al neavera helpemo de unu el siaj membroj, fondis kaj ekfunkciigis ĝin en komenco de monato Marto de kuranta jaro. La celoj de tiu Presserva Oficejo estas jenaj:

1. Informadi la tutan pollandan gazetaron pri la stato, disvastigo kaj sukcesoj de Esperanto sur Ĉiuj kampoj de nacia kaj internacia vivo.

2. Informadi eksterlandan gazetaron pri la ĉefaj atingoj de Esperanta movado en Pollando kaj ankaŭ pri nia ĝenerala kultura, soci-ekonomia, artistika a. vivo.

3. Helpi al interligo de eksterlandaj kulturaj asocioj kun Pollando pere de Esperanto

Tiaj larĝaj celoj bezonas la helpon kaj kunlaboron de senescepte Ĉiuj Esperantistoj de Pollando.

Ni do tiuvoje turnas nin al Ĉiuj Esperantistoj de Pollando kun la afabla peto je kunhelpo kaj kunlaboro: financa, morala kaj redakcia kaj petas ĉiujn, kiuj ne ricevis la detalan cirkuleron kun »Deklaracio«, ke ili turnu sin senpere al la Redakcio de »Pola Esperanto Presservo« Warszawa, ul. Widok 19. (tel. 234-84). Oficejo malfermita ĉiutage de 10-12. Tie ankaŭ troviĝas la Sekretariejo de nia tiujara Tutpollanda Esperanto-Kongreso, okazonta en Varsovio dum 4 kaj 5 junio 1933.

Pacifista „P A C O“ Parto.

P A C O P E R E S P E R A N T O

Gabriel Chavet

Mi esperas, ke neniu riproĉos min pri atenco kontraŭ neŭtraleco de nia movado, se mi deklaras, ke la disvastiĝo de Esperanto estas konsiderata de preskaŭ ĉiuj Esperantistoj kiel unu el la plej efikaj rimedoj por certigi tutmondan pacon. Ĉiuj scias, ke tiu alta, bela celo gvidis nian Majstron en la ellaborado de lia genia verko. Multaj el ni ĉetero entuziasme lernis kaj propagandis Esperanton, ne pro utilaj, praktikaj celoj, sed precipe, ĉar ili konsciis, ke tion farante, ili partoprenas en iu modesta sed certa grado, en tiu granda entrepreno de internacia pacigo.

Antaŭ la milito, la Esperantistoj jam priokupiĝis pri tiu paca idealo. Ili ne nur multigis sian internaciajn rilatojn, lernante tiamaniere la toleremon, simpatian por alilanduloj, kreante en si mem internacian spiriton favoran al ĉiuj pacaj entreprenoj; sed plie, ili penis grupigi la teknikistojn de la paco, t. e. tiujn el ili, kiuj volas efike precize, labori en difinita organizaĵo por helpi la starigon de paco pere de taŭgaj institucioj. Ili fondis Societon Esperantistan por la Paco, kies organo Espero pacifista aperis unuafoje en 1905 dum la unua Kongreso kaj kies prezidanto estis mia malnova amiko Gaston Moch, unu el plej kompetentaj teknikistoj de la paco.

Tiuj klopodoj de la pacifistoj ne estis vanaj; ili donis fruktojn post longa kaj terura militperiodo. Nuntempe oni decide aplikas la pacifistan programon: multigo de la traktadoj pri konstanta arbitracio funkciado de la Kortumo de Justeco de Hago; funkciado de Ligo de Nacioj kun ĝiaj aneksoj; oftaj interregnaj konferencoj, plimultigo de ĉiuspecaj internaciaj rilatoj inter la privataj institucioj, inter infanoj, studentoj, homoj el ĉiuj klasoj, kaj super ĉio, universala, potenco, nekontraŭstarebla malamo al milito, kiu, ni tion devas esperi, estos certe pli forta ol ĉio ajn por malhelpi la revenon al la milito.

HUNORO KAJ MAGORO.

Legendo pri deveno de la hunoj kaj hungaroj (magyar).

En malproksima oriento vivis potenca suvereno. Lia nomo estis Nimrodo. Li tre ŝatis Ĉasadi, kun siaj la plej belaj filoj Hunoro kaj Magoro Foje okazis, ke Hunoro kaj Magoro sen ilia patro iris Ĉasadi. Kun si portis ili 100 kuraĝajn kaj fortajn balulojn. Ili iris, iradis, kaj ili ne rimarkis, ke ili estas de longe trans sia lando-limo. Sed ju plu ili iris for, des pli plaĉis la arbaro al ili, kio estis plena kun tre multaj sovaĝaj bestoj. Foje dum la Ĉasado mirinde bela cervo eksaltis antaŭ ili, sed ĝi estis tiom bela, kian homokuloj ankoraŭ neniam vidis.

— Post ĝi! — ekkriis la du fratoj, la tre bela besto galopis, kiel la plej rapida ventego. En la postsigno de la cervo Hunoro kaj Magoro kaj kun ili la 100 bravaj bataluloj. Ili persekutis la cervon trans montojn kaj valojn, trans arbaroj kaj akvoj. La besto jen malaperis jen ekvidiĝis. Ĝi logis, logadis Hunoron kaj Magoron. Ĉevaloj de la bataluloj jam spiregis, la ĉevaloj galopis jam ĉiam pli kaj pli malrapide. Sed Hunoro kaj Magoro ne ĉesis la persekutadon. De mateno ĝis vespero ili persekutis la mirinde belan cervon.

— Sed vare. — La suno jam subiris kaj la belega besto malaperis en la marĉo. Tiel ili ne povis sekvi ĝin, ĉar la tuta trupo mortus en la marĉo. Tiel ili ne

Inter tiuj diversaj faktoroj de la nuna homara evoluo, ni Esperantistoj, devas pli speciale interesiĝi pri unu el ili: plimultigo de la internaciaj rilatoj. Oni povas diri pri tiu punkto, ke nun ekzistas, flanke de la diversaj ŝtatoj aŭ pli bone, estere de ili, granda internacia aŭ pli bone eksternacia nevidebla ŝtato, konsistanta el anoj de la diversaj landoj, kiuj interrilatas senpere de nacio al nacio kaj agadas sur internacia plano anstataŭ agadi en la kadroj de la diversaj ŝtatoj. Tiu eksternacia ŝtato konsistas precize el amaso de multaj grupoj, asocioj, societoj, institutoj, federacioj, k. t. p., kiuj celas diversajn objektojn, ĉu ekonomiajn, profesiajn, idealajn, sciencajn, k. t. p.

La ekzisto kaj evoluado de tiu Superŝtato estas certe esperplena, ĉar ĝi faciligos la estontan organizon de la mondo, en paca celado, sed en la nuna tempo, ni ne devas tro rapide ĝoji.

Efektive: kiel prave rimarkis s-ro Jacques Lambert, en sia kurso en la Universitato de Lyon pri la organizo de Paco, tiu Superŝtato estas nuntempe tute anarĥia; ĝi konsistas nur el egoistaj interesoj kiuj ne harmoniigas unuj kun la aliaj: ĝi ne posedas direktajn kaj kontrolajn superajn organojn; tio estas laŭ la Lyon a profesoro, eĉ danĝero por la paco, ĉar la diversaj gravaj interesoj, kiuj kunekzistas en la eksternacia ŝtato, ne povas esti sufiĉe kontrolataj de la naciaj registaroj. Li aldonas, ke ni nun troviĝas antaŭ tiu stranga paradokso: Neniu deziras militon sed ĉiuj timas ĝin ĉar ni scias, ke milito povas veni simple ĉar la interesoj de la diversaj nacioj estas forte kunligitaj kaj malbone kontrolataj. Kaj li konkludas per tiu malgaja konstato, ke mankas ĝis nun institucioj vere taŭgaj por regadi tiun eksternacian ŝtaton, institucioj, kiuj ne estus simple interregnaj organismoj, sed kiuj zorgus nur pri la ĝeneralaj, supernaciaj, tutmondaj interesoj.

(Daŭrigota)

povis ekkapti la belegan cervon. Sed la besto gvidis ilin sur tian belan teron, kian ili ankoraŭ neniam vidis. Tiu-ĉi estis bela insulo. Kiom ili povis vidi per okuloj, estis nur arbaroj kaj riveroj. Ili vadis ĝis genuo en la herbaro kaj en la sovaĝa floro. Grandaj vastmultegaj fiŝoj naĝis kaj ludadis en la sunlumo. Tiu-ĉi tero tre plaĉis al Hunoro kaj Magoro kaj ili decidis, ke ili faros tie kolonion. Do ili revenis al sia patro kaj ili rakontis al li inter grandaj laŭdoj la belecon kaj riĉecon die tiu tero kaj ili rakontis, ke la vivo estas tie facila kaj kia bonsorto atendas ilin. Poste ili petis sian patron, ke li permesu al ili, ke ili translokigu tien kun siaj ŝafaroj. La okuloj al la maljuna Nimrodo larmis. Doloris al li, ke li devis desiĝi de siaj karaj filoj. Sed li konsentis, ĉar li vidis, ke la filoj sopiras tiun teron. Li benis ilin kaj foriri lasis ilin. Hunoro kaj Magoro kun siaj bataluloj kaj ŝafaro translokiĝis al la nova lando, kiun la bela cervo montris al ili. Ili vivis jam 5 jarojn en la nova patrujo, sed ekster la propraj homoj ankoraŭ ili ne vidis aliajn homojn.

Ili decidis, ke ili ĉirkaŭrigardos en la regiono. Eble loĝas tie ankaŭ aliaj popoloj. Ili sin pretegis kun 100 bravaj bataluloj kaj ili multe aventuradis sur la granda stepo. Do jen ili vidis!

Iliaj okuloj kaj buŝoj restis malfermitaj pro la granda mirado. Granda trupo da knabinoj dancis tie

Skolta Esperanto-Movado.

Bona ideo pri utiligo de Esperanto.

La hungara skolta Federacio starigis apartan fremdulvidantan taĉmenton por 1933 kiu jam funkcias. Eĉ ĝi estu aparta esperantista skolt-gvidantaro.

Unu el la gvidantoj de la fremdulgvidada sekcio havas nun bonan ideon pri utiligo de Esperanto:

Kun ĉiu fremda skolta trupo venu almenaŭ unu skolto kiu, scias bone Esperanton ĉiu tia trupo ricevos en Hungarujo dum la jamboreo fremdulvidantan skolon, kiu ankaŭ scias Esperanton. Tiamaniere tiu hungara esperantista skolto klarigos ĉion en Esperanto al la fremda trupo kaj la interpretisto de la trupo (la alilanda esperantista skolto) tradukas en sia propra nacia lingvo por siaj samlandanoj Tiuj do en propra lingvo bone aŭdos ĉion. Vi rimarkas, ke Esperanto estos grava kaj oficiala helpilo. Oni pensas, ke per Esperanto oni povus tion pli bone realigi, ol per aliaj fremdaj lingvoj, ekzemple angla.

La ideo estas bona, praktika. Sed grava estas ke ĉiu nacia skolt-ligo vere kunportu la necesan nombron de skoltoj, kiuj scias Esperanton. Do konigu tiun ideon tuj al via nacia skolta ligo, proponu esperantan instruadon aŭ memlernadon el libroj. Eble skoltgvidantoj kelkloke mem — aŭdinte pri tio — tuj lernos Esperanton, ke ili restu la interpretistoj ankaŭ por Esperanto.

Ni ne povas esperi, ke al la jamboreo venos miloj da esperantistoj, sed se venos nur unu-du kun ĉiu trupo, jam estas oficiala sukceso.

Oni sciigas nin, ke »la patro de skoltoj«, lordo Baden Powell anoncis sian viziton kun sia edzino kaj 6000 anglaj skoltoj dum aŭgusto al la apud-Baltik-landoj (inter aliaj) Pollando kaj Estonio, post la reveno de Mond-skolt-tendaro en Gödöllő. Tio estas unua vojo kiam la lordo Baden Powell vizitos tiujn-ĉi landojn (Red)

ringe-ronde apud la plaŭdanta riverfonto. La knabinoj bele manprenis unu la alian, proksimume 100 knabinoj estis, kaj tiel ili dancis en la rondo. En la mezo du knabinoj dancis, sed tiuj du knabinoj estis tiel belaj, kiajn hom okuloj ankoraŭ ne vidis. Hunoro kaj Magoro interrigardis kaj ankaŭ la aliaj bataluloj. Ili diris neion, sed ili tamen sciis, kion ili pensis.

Ili aliris al knabinoj kaj ĉiu elektis unu-unu el inter ili, kiel edzinon. Hunoro kaj Magoro kaptis tiujn du knabinojn, kiuj dancis en la mezo de la rondo. Ili estis filinoj de Dulo, kiu estis svennero de Alanoj. Tiun el ili Hunoro kaj la alian Magoro edzinigis. Kaj post multaj, multaj jaroj el la gento de Hunoro devenis la Huna, el la gento de Magoro devenis la Hungara nacio.

La mirinda cervo montris do la vojon al hungara gento por trovi patrujan, genton. Nun ĝi montras al tutmonda junularo la vojon al nobla celo, la mondtendaro! Gi gvidu la homaron al pli bona estonto!

(El hungara tradukis Andreo Szikszay)
Pri la insigno de la Jamboreo: la Mirakla cervo.

Karaj fratoj, vi legis, ke la mirakla cervo gvidis la praulojn de la hungaroj - laŭ legendo - el malproksima Azio al direkto de Eŭropo por serĉi novan patrujon. La hungaroj antaŭ pli, ol 1000 jaroj venis en sian nunan patrujon kaj defendis ĝin dum jarcentoj, vivis, laboris, suferis tie. Al reĝo Ladislao la Sankta

Anglujo La semajna skoltina gazeto The Guide, komence de februaro enhavas esperantan paĝon.

Ĉeĥoslovakujo En skoltaj gazetoj »Tábor-tiž kaj slovaka « Skaut » oni ofte aperadas sciigojn pri skolta esp movado En unu el lasta numero de »Tá-bortiž« aperis artikolo »Ĥinujo-Japanujo amikiĝu per la skoltoj« tradukita de frato A. Csáder nia fervora S. E. L. - ano, el ununa numero de »Juna Esperantisto«. Gratulon!

Grava decido pri konstanta disaŭdigado de la skolt-esperantista-programo en Ĉeĥoslovaka radiostacio.

Dank' al la intigo de nia fervora, neniam lacigebla hungara S. E. L. repr. frato P. Balkanyi oni decidis enkonduki unu-duonhoron por esp skolta-programo en la radiostacio Bratislava. La reĝisoro de la E-programo s-ro pro-Jukl, vizitis nian fraton A. Csáder kaj anoncis sian konsenton pri dediĉo por tiu ĉi celo. Ne havante tempon prizirigi tion, frato A. Csáder interrilatis kun fratoj Macek kaj Kiss, kiuj akceptante proponojn, promesis serioze gvirdi kaj prilabori programon. La unua tia skolta-disaŭdigo okazos verŝajne la 24. IV je la 22 h. Espereble ĝi plaĉos al la tutmonda frataro!

Esp. skoltaj kursoj okazas nuntempe en komarno, Roŝice, Prostejov, Bratislava [2], Novi Zamkij kaj en 4 plimalgrandaj lokoj.

Estonio. En Valk oni gvidis senpagan kurson de Esp por skoltoj ĉe (Kristana Societo de Juuaj Viroj) gvidita de s-ro V. Tartlan. La kursanoj fervore jam korespondadas kun eksterlandanoj.

Fondiĝis esperanto skolttrondoj en Töwa (Torva, Rongu' Aakre.

Pollando. Pola S. E. L. agento interrilatis kun la estro de la Pola Skolta Asocio s-ro A. Olbromski kiu favoris Esperanton kaj rekomendis ĝian ellerton al ĉiuj skoltoj, kiuj vizitos jamboreon.

aperis poste denove la cervo, sed ĝi jam havis krucon inter la kornaro. Ĉar la hungaroj tiam jam ne volis konkerti, sed nur defendi kaj defendis dum jarcentoj sangaj okcidenteŭropanon kontraŭ orientaj atakoj. La dua signo de la cervo: iri la vojon de kristanismo kaj defendi la kulturon! Kaj nun denove ekaperas la mirakla cervo: ĝi estas insigno de la mondjamboreo, okazonta en Gödöllő en 1933. Sed nun ĝi ne logas la hungarojn al bataloj, kontraŭe ĝi logas la filojn de la nacioj, kiuj ne kirason portas, sed la veston de la am-armeo. Gi ne vokas al batalo, al frata tendarado de amikeco. Ili venos ne kiel malamikoj, sed kiel amikoj, kamaradoj, fratoj.

La blanka cervo de la jamboreo signifas la amon, la amikecon, la fratecon! Gi ne estas jam nur hungara sed apartenas al la tuta mondo, ĉiuj popoloj povas trovi en ĝi sian intenan animon.

Do ni iru, kiel foje la kavaliroj kaj herooj de la prahungaroj, ne flankiĝante, ne konate ripozon. Ni iru plenkore post la mirakla cervo ĉar ĝi signifas nun tion, kio estas la plej grava en la mondo: la amon.

Kaj ni esperantistoj aldonu: ni iras la vojon de la blanka cervo portante la verdan stelon sur brusto kaj en la brusto, la stelon de la espero, ke ni komprenos unu la alian, kiel veraj fratoj kaj per tiu mirakla interkomprenigilo servos plej efike la realiĝon de la amon!

Aleksandro Sik

Abonprezoj por „Juna Esperantisto“

sendu rekten al la administracio, per nacia papera mono aŭ internaciaj poŝtaj respondkuponojn aĉetebblaj ĉe vialoka poŝtejo aŭ U. E. A. resp. aĉetebblaj ĉe vialanda U. E. A. delegito. Sendu en letero aŭ pere de internacia poŝtmandato. Por poloj plej oportuna pagmaniero estas pere de nia poŝtĉekkonto P. K. O.

Nr. 413.944.

Ni kore dankas al ĉiuj donacintoj por la subtena kaso, kiuj estas invitataj.

Krom al la eldonejo, oni povas pagi al la naciaj reprezentantoj. Sendante abonprezon al ili, bonvolu ĉiam aldoni »por abono de J. E.«

Anglujo (2 ŝ, 4 p.): S-ro Norman Booth, Netherton-Huddersfield
 Ĉeĥoslovakujo (16 kr.): S-ro Aleks. Csáder, Bratislava I. Zamočnicka 8.
 Estonio (2 Ekr.): S-ro Karl Joost, Tartu, Võru 74 5.
 Francujo (12 fr) S-ro M. A. Boderau, 212 Bould J. J. Rousseau Le Mans (Sarthe).
 Germanujo (2.-M.): S-ro A. Neupert, Leipzig N. 23., Wedelstr. 17.
 Hungarujo (24 p.): S-ro P. Balkanyi, Budapest 507.
 Svislando (2.50 fr.): Centra Oficejo de T.E.J.A. S-ro R. Kutzli St. Gallen Scheibenackerstr. 6.
 Sovetunio (1.-R.): S-ro Petro Surjanenko, Valki. Harkovska Oblast.
 Usono (0.50 dol.): S-ro H. Fazel, Topeka Kansas, 1122 West Eighth Street.
 Jugoslavujo (30 din.): S-ro Lapenna Ivo, Zagreb, Primorska 11.
 Portugalujo (8 ess): S-ro Alberto Henrique de Sousa, Setubal, largo D. ro. Francisco Soveral 4-3a.

HUMORO.

LA TAGMANĜO.

(Skolta sceno de Dro Geza Borka.)

Maĉjo, junskolto: (eniras portante manĝopoton en la mano. Li estas malbonhumora kaj murmur-grumblas).

Mmm... jam denove fabolegomo. Ankaŭ la pasintan semajnon ni havis tion. Se tiel daŭros, tiam ni baldaŭ ankaŭ kafmanĝos jam fabolegomon. (Li ekŝidas, manĝas.) Oni jetas sur ĝin peceton da viando kaj la tagmanĝo estas preta ĉu tio ĉi estas viando? Ĝi estas tendenaĵo. Ie ĝi ja rompiĝos miaj dentoj.

Mia poŝtranĉilo eĉ ne tranĉas ĝin. Nu, bedaŭrinda stomako mia, per tio ĉi vi travos laboron. Dum la nokto mi denove sonĝos pri virbovoj, Li ekfilaras ĝin). Ho, tiu ĉi malbenita kuiristo, tu ĉi legomo estas krome eĉ brulumita! Sed kiom ĝi brulgustas! Ĉe la brulgustkonkurso ĝi gajnis la unuan premion (Li manĝas).

Tiu ĉi oni ne povas manĝi! Ĝi ja eliĝos el mia buŝo! (Li manĝas). Br! Tiu ĉi ja ne suberinas tra mia gorĝo. Hah. (Li manĝas).

Hu, kial mi nur alvenis por tendi?, Kial mi nur ne restis hejme? Ĉu mi bezonis tion ĉi? Li manĝas). Matene oni vekas la homon jam je la sesa horo. Ie la sesa! Ordviva homo nur tiam sin turnas al sia aŝia flanko. (Li manĝas), Poste la lavado en la rivereto! Br. Ĝi estas tion malvarma, ke glacipecetoj naĝas en ĝi! Dio mia, hejme mi lavas min ĉirkaŭ la duono post la sepa en varmeta akveto. (Li manĝas). Poste ankaŭ miajn botojn mi devas mem purigi. Tiuj pli aĝaj skoltoj estas neniel ĝentilaj. Matene ili povus tiel bone purigi la ŝuojn de ni malgranduloj. Ili estas ne-

niel ĝentilaj! (Li manĝas). Nu kaj jen estas la supro de ĉio, la fabolegomo! La fama fabolegomo! Ĝi estas tiom malmola, ke oni povas skulpti el ĝi statuon por la glorinda kuiristo, kiu ĝin elpensis ĉu tio ĉi estas tagmanĝo? Nu dankon! Eĉ tian ĝi ne taŭgas al prudenta homo, se ĝi ne estus brulumita. Sed ĝi estas brulgusta! (Li manĝas). Terure, kia vivo estas tiu ĉi! Nia hundo hejme fartas pli bone Pri la kato mi eĉ ne parolu. Tiuj certe ne manĝus tian tagmanĝon. Sed ankaŭ mi ne estos tion stulta. (Li leviĝas). batileme! Certe ne. Mi aliros la sinjoron trupestron kun tiu ĉi »minescaskio« kaj mi jetoj ĝin antaŭ liajn piedojn! Ien, sinjoro estro manĝu ĝin, se vi povas nur tian tagmanĝon mendi! jes mi aliros lin. Certe! Foje devas jam ŝanĝiĝi tiu ĉi ne toleribla situacio!

Trupestro (enirante): Nu, kio estas Maĉjo, fileto mia? Kial vi estas tiel kolera?

Maĉjo! Hehehe, sinjoro estro mi petas vin, mi ne estas kolera.

Trupestro: Ĉu la tagmanĝo estis bona?

Maĉjo: Jes, bonega ĝi estis, sinjoro estro!

Trupestro: Ĉu vi ŝatas la fabolegomon?

Maĉjo: Certe, mi petas. Mi tre ŝatas ĝin.

Trupestro: Ĉu ĝi bongustis al vi?

Maĉjo: Certe ĝi bongustis. Nur...

Trupestro: Nur?

Maĉjo: Nur ĝi estis iom... iom malmulta.

Trupestro: Nu venu, ni ankoraŭ skrapkolentos 1-2 kulerplenen.

(Ambaŭ toriras)

El la hungara tradukis:
Aleksandro Csáder

KORESPONDADO:

S-ro Ernest Belinfante, stud., Banstraat 22, Den Haag, Nederlando.

Pollando. S-ro Henryk Białoszewski, Warszawa Wschodnia. Gł. Warszkaty kolejowe.

Pollando. S-ro Hećko Jan, Kraków, Barakowa 7, m. 12.

Pollando. S-ro Herbert Paruzel, kolegio XX

Oblatoj 20. en Lubliniec Pola Silezio pri literaturo.

S-ro Max Thoma, stud. kun rusoj: Adr. Rorŝa-herstr. 139, St Gallen, Svislando.

Belgujo. Solskolto Jacques Broussier, »Ses Boc-lettes«, Villers-b-Jambon — kun tutmondaj skoltoj.